WIKIPEDIA

Balia lingvo

La **Balia Lingvo** estas Okcident-malajopolinezia lingvo parolatata de 3.9 milionoj da homoj (en 2001) sur la Indonezia insulo Balio, kaj ankaŭ norda Nusa Penida, okcidenta Lombok kaj orienta Javo.[1] Plejo da parolantoj de la balia ankaŭ scipovas la indonezian lingvon.

La kavia lingvo estas parenca sacerdota lingvo.

Balia lingvo	
Basa Bali	
Regiono	Balio, Nusa Penida, Lombok kaj Javo, Indonezio
Parolantoj	3,9 milionoj (de 2 001)
Skribo	Latina, Balia
Lingvistika klasifiko	
Aŭstronezia	
Malajo-polinezia	
Balio-sasaka lingvo	
Balia	
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	ban
ISO 639-3	ban
Glottolog	bali1278
Angla nomo	Balinese
Franca nomo	balinais

Enhavo

Klasifiko

Fonologio
- Vokaloj
- Konsonantoj

Gramatiko
- Reĝistroj (ĝenroj)

Skribsistemo
- Balia skribsistemo
- Latina alfabeto

Piednotoj

Referencoj

Aliaj projektoj

Klasifiko

La balia lingvo estas parto de la austronezia lingva familio, kaj estas proksime parenca al la sasaka kaj la sumbaŭa lingvoj.

Noto: Ĉi tiu artikolo eble entenas fonetikajn simbolojn de la IFA en Unikodo. Vidu la prononcan ŝlosilon en artikolo pri la IFA.

Fonologio

Vokaloj

	Antaŭa	Centra	Dorsa
Alta (ferma)	i		u
Meza	e	ə	o
Malalta (aperta)		a	

Konsonantoj

		Bilabialo (dulipa)	Alveolaro (alveola)	Palatalo (palata)	Velaro (vela)	Glotalo (glota)
Halto aŭ afrikato	Senvoĉa	p	t	tʃ	k	ʔ
	Voĉa	b	d	dʒ	g	
Frikativo (frota)			s			h
Nazalo (naza)		m	n	ɲ	ŋ	
Lateralo (flanka)			l			
Trilo			r			
Duonvokalo		w		j		

Gramatiko

Reĝistroj (ĝenroj)

Balia lingvo havas malsamajn registrojn dependantajn sur la interrilato kaj statuso de la interparolantoj: malalta (*basa ketah*), mezo (*basa madia*), kaj alta (*basa singgih*). *Basa singgih* enhavas multajn pruntvortojn de Sanskrito kaj Java lingvo.

Skribsistemo

La balia lingvo estas skribata per du malsamaj skribsistemoj:

- la Balia skribsistemo, kaj en modernaj tempoj
- la Latina alfabeto.

Balia skribsistemo

La Balia skribsistemo (*Carakan*) estas abugido, kiu devenas finfine de la Brāhmī skribsistemo de Barato. La plej fruaj konataj surskriboj datiĝas de la 11-a jarcento p.K.

Hodiaŭ nemultaj homoj estas familiaraj kun la Balia lingva skribsistemo.[2]

Latina alfabeto

Lernejoj en Balio hodiaŭ instruas formon de la Latina alfabeto, nomata *Tulisan Bali*, por skribi la balian lingvon.[3]

Piednotoj

1. ↑ Ethnologue.
2. ↑ Omniglot.
3. ↑ La Baliaj Lingvoj, *far Fred B. Eiseman, Jr* (http://www.balivision.com/Article_Resources/TheBaliniseLanguage.asp) - *Bali Vision*

Bazaj signoj de la Balia lingva skribsistemo

Referencoj

- . *Omniglot*. Alirita 2007-03-07.
- Gordon, Raymond G., Jr. (ed.) - Gordon, Raymond G., Jr. (ed.). (2005) “Bali (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=ban) - Balio (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=ban)”, *Ethnologue: Languages of the World, Fifteenth edition - Ethnologue: Lingvoj de la Mondo, Dek-kvina redakcio*. Dallas, Tex.: SIL International - SIL internacia.

Aliaj projektoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Balia_lingvo&oldid=5877974"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 08:19, 28 jan. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.